

& La flatema maro:

< Minore rekante 22 el 31 batoj por strofo, entute 465 paŝoj dum 6 minutoj. Maĵore rekante 9 el 17 batoj por strofo, entute 255 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per sama melodio maĵora kiel por Ora Koko, verkub nova rekantaĵo, kaj alternativon donis minore tiujn de Harpa rimaĵo (Hørpu ríma), kies rekantaĵon li tradukis de feroa.>

(#Melodioj:

(

(#Minore: <:31> /La La SiLa TiTi TiTi; TiLa SoFa MiMi; LaLa LaTi doTi LaTi; do Ti La a; La SiLa TiTi TiTi; TiLa SoFa MiMi; Mi LaLa LaLa LaTi; do Ti La a)

?

(#Maĵore: <:17> /dore mifa soso somi; rere mimi mire dodo;

(#Rekantaĵe: dore mifa soso mi; rere mimi rere doTi La)

)

)×15)+

(&Strofoj:

'1

(&Minore: /Sur monteto apud maro ;

(×: - **vin invitas kuri** -.)

la paŝtisto pri l' ondar

(×: **Sorcĥistoj**, ; **Estu ĉe l' junulino**, ; **vin invitas kuri**, ; **ilin akceptu zorge**, ; **sorcĥistoj!**))

?

(&Maĵore: /Sur monteto apud maro ; la paŝtisto pri l' ondar

(×:; **Klare blua milda mar'** ; **Glate flata estas la ondar'**.)

)

'2 klare-blua, milda, glata, ; kaj apenaŭ eĉ lulata

'3 per tuŝeto de zefiro, ; sin delectis kun admiro

'4 kaj ekkriis: "Ho, plezuro ; devas esti marveturo!"

'5 Nu, li siajn ŝafojn vendis, ; por la mono ŝipon mendis,

'6 ĝin per figoj ŝarĝis plena, ; velis for kun kor' serena.

'7 Li kun kor' serena velis, ; sed subite, jen, ribelis

'8 tiuj ondoj milde glataj ; Ili sturmis nun, pelataj

'9 de sovaĝa ventovipo, ; ĝis la flankon de la ŝipo

'10 ili romp'is per breĉigoj, ; dronis ŝipo, dronis figoj.

'11 Nudan vivon la povrulo ; savis helpe de tabulo.

'12 Iam poste li ekaŭdas, ; ke la maron iu laŭdas:

'13 "Kiel blua, milda, glata, ; kaj apenaŭ eĉ lulata

'14 kaj apenaŭ eĉ lulata ; de zefiro, kiel flata!"

'15 De kolero li ekbolas ; "Jes, ĝi flatas, figojn volas!"